



LA VERDA STELO

**Esperanto
Nederland
sekcio
Groningen-Drente**


junio 2004



LA VERDA STELO

eldono de Esperanto-klubo Groningen-Drente,
sekcio de ESPERANTO NEDERLAND

- Prezidanto** s-ro J.S. Swenker
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
tel. 050 527 45 72
- Sekretariejo** s-ino W. van Ganswijk-Vlasblom
Huygensstraat 27
9727 JA Groningen
tel. 050 525 00 86
- Kasisto** s-ro L. Staghouwer
Julianalaan 25
9781 ED Bedum
tel. 050 301 40 15



- Kunvenejo** Dreesflat, W. Dreesstraat 1
ĉiun alternan ĵaŭdon ni kunvenas
de la 19h45 ĝis la 21h45
- Esperanto-centro** T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
J. Swenker, tel. 050 527 45 72
- Redakcio** Koos Scharroo, Wil van Ganswijk-Vlasblom

Karaj legantoj,

Vi verŝajne jam rimarkis, ke nia klubgazeto aspektas ĉi-foje alie ol kutime. Dum la jarkunveno Koos Scharroo estis pe-tata de mi transpreni mian taskon rilate la korektadon. Li jesis kaj kiam li diris, ke li volonte aranĝus alimaniere la enhavon, ni akceptis lian proponon. Pro tio, ke nia kopiilo ne kapablas kopii kolorojn, Koos prenis sur sin ankaŭ tiun taskon per sia printilo. Al Petra kaj Henk van Kappen, kiuj dum

pli ol 11 jaroj prizorgis nian gazeton, kaj prizorgis entute 39 eldonojn, ni ŝuldas multe da danko. Post la somerferioj ni konkretigos tiun dankon per la enmanigo de Esperanto-libro kaj floroj.

Volonte ni ricevos viajn rimarkojn pri la nova aspekto kaj proponojn por la enhavo de estontaj eldonoj, por ke Koos povu ankoraŭ pli aktualigi kaj agrablighi nian klubgazeton.

Wil van Ganswijk-Vlasblom

Renkonti unu la aliajn dum la somerferioj vi povos


★ **la 15-an de julio** en **Scandinavisch Dorp**,

Oude Badweg 1, Eelderwolde kaj

★ **la 12-an de aŭgusto** en la ĝardeno de la

Schimmelpenninckhuis,

Oosterstraat 53, Groningen.



**Venu tien ĉirkaŭ la 10-a horo
por kune trinki kafon !**



Op 5 mei 2004 vond in Groningen een groot **bevrijdingsfestival** plaats. Fieke (een actief jong NEJ-lid uit Groningen) stelde de afdeling *Groningen* van *Esperanto Nederland* voor een gezamenlijke stand te bemensen tijdens het festival. En dat werd geregeld. De kosten en de stand werden gedeeld! Het informatiemateriaal van NEJ en Esperanto Nederland lag goed in het zicht, werd volop meegenomen. en er werden veel leuke gesprekken gevoerd. Fieke verzamelde zo'n 10 adressen van mensen die in september 2004 haar cursus willen gaan volgen! Een succesvolle middag!

Ineke Emmelkamp

Alvoko de kasisto...

Dankon, dankon. Anticipan dankon.

Nova jaro kun novaj ŝancoj. Sed ankaŭ kun novaj devoj. Ĉu vere novaj? Ne, ne ĉiuj devoj estas novaj. Ekzemple la devo de la membroj kaj abonantoj pagi sian kotizon. Multaj el vi jam pagis la ŝulditan sumon por ĉi tiu jaro kaj koran dankon pro tio. Se vi ne jam pagis vian membro- aŭ abonkotizon, bonvolu plenumi ĉi tiun devon post nelonge. Sur la interna flanko de la malantaŭa kovrilo vi trovos la necesajn informojn. Mi, kiel kasisto, anticipu dankas vin pro via kunlaboro.

Dank, dank, hartelijk dank. Bij voorbaat dank.

Het is een goede gewoonte dat veel leden en abonnees reeds voor 1 januari de contributie of het abonnement betalen. Ook nu weer kon ik een behoorlijk aantal vroege betalingen boeken. Voor een penningmeester een heuglijk feit. Was ook jouw/uw betaling daarbij, dan daarvoor mijn hartelijke dank. Maar ook voor hen die wat minder makkelijk afstand doen van de met zoveel moeite vergaarde euro's komt eens de tijd om het onvermijdelijke onder ogen te zien: er zal toch moeten worden betaald. Had je/u tot nu toe geen tijd om te betalen, of een ander goed excuus waardoor je/u nog niet aan je/uw financiële verplichtingen namens de vereniging hebt kunnen voldoen, dan hoop ik dat er binnenkort een einde komt aan deze moeilijke periode in je/uw leven en dat je/u de rust vindt om een bank- of giro-opdracht uit te schrijven. Welk bedrag? Naar welke rekening? Geen paniek. Achter in deze informilo staan alle gegevens die nodig zijn om dit varkentje te wassen. Met een beetje geluk heb ik dan binnenkort van alle leden en abonnees betaling ontvangen. Alvast mijn hartelijke dank voor de medewerking.

Luit Staghouwer, penningmeester

Klubvesperoj

SEPTEMBRO

9 Ferioj

23 **Ed Borsboom** verkis pri **Andreo Cseh** libron, pri kiu li prelegos

! *La estraro esperas, ke ĉeestos multaj membroj!*

OKTOBRO

7 **Malferma tago** (*Pripensu kiel varbi vizitontojn!!*)

21 **William Auld**

NOVEMBRO

4 **Historio pri tai chi kaj chi kung** - H. van Hogen-Cornelissen

18 **La evoluo de farmado en Nederlando** - W. Akkerman

DECEMBRO

2 *temo ankoraŭ nekonata*

16 **Festa kunveno** pro la naskiĝtago de Zamenhof.

Ĉi-jare ni **ne** organizos Zamenhof-tagon, sed anstataŭe ni organizis Esp-o-tagon la 12-an de junio.

La temoj de la klubvesperoj estas diversaj, kiel vi povas konstati, do venu por informiĝi pri ili.



Naskiĝtagoj

aŭgusto

14 J. Reddingius

16 J.W. Scharroo

17 A. Mulder-Drent

30 J.B. Swenker

septembro

3 W. Akkerman

8 A.M.H. Aalders-Hagemeijer

17 H.W.T. van Hogen-Cornelissen

24 A.E. van der Heij-Alblas

26 G.M. van Reenen

30 A.H. Thomas-Nitzsche

GRATULON!



oktobro

15 C.H.T. Behr-Kunst

29 A.M.H. Dodebier

30 P. van der Vlis

novembro

9 J. Schouten

10 E.L van der Roest

Kio okazis en Groningen?



O La 5-an de februaro 2004. okazis nia jarkunveno, kiu estis kiel ĉiam ankaŭ normala klubkunveno, kio signifas ke ni multe babilis.

Wil voĉlegis sian funebran paroladon okaze de enterigo de Zwaantje Boven. Ĉu tio estas parto de jarkunveno aŭ de normala klubkunveno fakte ne tro

gravas.

Kiel ĉiun jaron ni petegis la ĉeestantojn fariĝi estrarano. La pasintan jaron Koos ne forte malakceptis. Ĉi-jare li akceptis la postenon de redaktoro de nia bulteno. Do kiam vi havos rakontojn aŭ informojn por la klubanoj, sendu ilin al

koosscharroo@home.nl. Ni do ne havos alian estraron, sed feliĉe ĉiu ofertas sian agadon, kiam tio necesas.

Aliaj sciindaĵoj estas ke:

- ☆ la kotizo restas po € 11,34 jare
- ☆ en la kaskontrol-komisiono por 2004 estas Bram vd Heij kaj Koos Scharroo, kaj Ineke Emmelkamp kiel rezervulino.

La ceteron vi legos en la oficiala raporto pri la jarkunveno.

La 19-an de februaro.

Staris surtable en nia kunvenejo 3 grandaj transloĝiĝ-skatoloj. En ili troviĝis de nia biblioteko ĉiuj libroj, kiujn gardis dum multaj jaroj Petra kaj Henk van Kappen en Kiel-Windeweer. La demando estis: ĉu disdonaci aŭ pli longe konservi ilin, kvankam neniu el niaj membroj iam prunteprenis unu el la libroj? Ne eblas meti ilin en ŝrankon de nia nuna kunvenejo. Post iom da interkonsiliĝo ni decidis fordoni la librojn.

Tiam estis kafo! Pere de Wil salutis nin Riet Heide kaj Tini Lanooy, Johan estis intervjuita de Henk van Santen en radioprogramo de Radio Hoogezand kaj Hennie van Hogen informis nin pri artikolo de Marc van Oostendorp en *Onze Taal*.

Wil informpetos de la esperantistoj en Bremeno kaj de la retkursanoj la interesiĝon pri Esperanto-tago en Groningen la 12-an de junio ĉi-jare. Tiam vojaĝi estos pli agrable ol dum Zamenhof-tago, meze de decembro.

La temo de la vespero estis: *profesio*. Koos Scharroo tre bone preparis sin pri tiu temo. Lia profesio estas asisti kirurgojn ĉe koroperacioj. Pere de modela koro kaj bildoj sur sia komputil-ekrano li montris al ni tion, kio estas normala rilate al la koro kaj tion, kio antaŭiras korinfarkton. Por ni nekutimaj vortoj, kiel *angio*, *koronaria*, *torako*, *karotidoj*, *pulma arterio* kaj *grefto* estis multfoje uzataj. Ni nun scias la diferencon inter *kardiologo* kaj *korkirurgo* kaj ni vidis koroperacion kaj instrumentojn, kiujn oni uzas dum tiaj operacioj. Strange estis, ke sur unu el la aparatoj estis legeblaj: *sternumsegilo* kaj *ne mergi*, do Esperanto-vortoj 😊. Je la fino ni aŭdis, ke la paciento, kiu estis operaciita, feliĉe postvivis la operacion. Koos tre entuziasme kaj flue prelegis pri sia por ni ne kutima profesio.

La 4-an de marto 2004.

La temo de ĉi tiu vespero estas Julio Baghy, unu el la plej konataj verkistoj en Esperantio.

Post la malfermo, kiel kutime, ni parolis pri la freŝdataj okazintaĵoj en Esperantio. Montriĝis, ke en Roderwolde loĝis esperantistino,

kiu mortis antaŭ nelonge. La klubo verŝajne heredos ŝiajn librojn.

Ankaŭ ĉi tiun jaron Wil ricevis el Bulgario poŝtkarton kun du tradiciaj talismanoj, memfaritaj el buntaj fadenoj.

Wil proponas jenan programon por la eble venonta somera renkontiĝo: ŝipveturado tra la urbaj kanaloj, vizito al

Navigadmuzeo kaj kuna tagmanĝo sur la *Krespo-ŝipo*. Ni opinias la proponon bona.

Hennie kunportis gazetartikolon pri nombroj en pluraj lingvoj. Montriĝis, ke en nur kelkaj lingvoj la sinsekvo de nombropartoj estas logika kaj precipe konstanta: dek unu, dek du, ktp. Elstaras la hungara kaj Esperanto! Koos rimarkas, ke la klubaj informoj en la retpaĝo de Johano bezonas ĝisdatigon.

Www.esperantoland.org montras, kie en Eŭropo troviĝas E-kluboj, kaj pri ĉiu klubo haveblas informoj. Nur du nederlandaj kluboj estas sur la mapo. Koos aldonos la nian.

Sinsekvas du gravaj *programeroj*: la kafo (bona) kaj Julio Baghy (interesa).

Hennie trovis retajn informojn. Tiuj informoj estas sur la retpaĝo de Wil. Ses jarojn Julio Baghy estis en Siberio kiel militkaptito, kie li verkis interalie poemojn. La romaneto *La Verda Koro* temas pri la vivo de esperantistoj en Siberio.

Koos trovis informojn per Google (reta serĉmaŝino). Li parolis pri la renkontiĝo inter Julio Baghy kaj iu, kiu ŝajne estis italo. Malgraŭ la lingvobaro oni tamen sukcesis kompreni unu la alian. Estas amuze, ke la supozita italo montriĝis franco, kiu parolis Esperanton.

Luit konsultis la retan enciklopedion *Vikipedio* kaj tie trovis detalajn informojn pri Julio Baghy.

Bets kunportis tri librojn de J.B., sed ne havis tempon por legi ilin.

Lies daŭre estas tre okupita pri aliaj interesaj temoj. Oni jam demandis ŝin: „Ĉu vi estas kantanta filozofino aŭ filozofanta kantistino?”

Wil trovis informojn en la revuo *Esperanto* kaj ankaŭ per *Google*. En 1989 ŝi ricevis leteron de amikino en Poznan. Ankaŭ tiu amikino tiam sendis informojn pri J.B., kiujn Wil laŭtlegis. Ŝi krome kunportis dekon da libroj de kaj pri Julio Baghy.

Johano havas bonŝancon: ne plu estas tempo por lia kontribuo pri Julio Baghy.

La 18-an de marto 2004.

Pro tio, ke nia prezidanto Johano devas ĉeesti kunvenon aliloke, Wil transprenis la prezidantecon.

Kvankam la programo sciigis, ke ni parolu pri s-ro Hektor Hodler, ni parolis pri tiu temo nur malmulte. Evidentiĝis, ke pri Hektor Hodler temas 2 libroj, nome *Lia vivo kaj lia verko*, kiun verkis E. Stettler kaj de E. Privat *Lia vivo kaj morto*, verkita post la jaro 1967. Pri Hodler ni plu parolos la sekvan kunvenon.

Ni interkonsiliĝis pri la somera *Zamenhof-tago*, kiu okazos la 12-an de junio 2004. Wil komunikis, ke ŝi ricevis el Bremeno informon, ke 6 ĝis 10 esperantistoj verŝajne partoprenos tiun tagon. Oni fakte ne povas ion decidi pro multaj necertecoj. Wil jam elpensis allogan programon, sed ion antaŭmendi ŝi ankoraŭ ne povas pro la nekonata nombro da partoprenontoj.

Wil ricevis leteron, kiu temas pri simpozio de la *Association des Etats Généraux des Etudiants de l'Europe*

(AEGEE), kies temo estos *European Day of Languages*. Ĝi okazos la 24-an de novembro 2004. Estas interese kaj ĝojige, ke oni

petas, ke dum tiu simpozio parolu esperantisto.

La 1-an de aprilo

Pri ĉiaj temoj ni babilis. Ekzemple pri:

- ☆ stultaj komputiloj, kiuj ne komprenas retadreson kun nur malgranda eraro, kiel kroma punkto.
- ☆ germana esperantisto, kiu vizitis amikino en Groningen, sed kiu unue vizitis Wil van Ganswijk.
- ☆ Ĉinia Radio Internacia, kiu denove havigis premion al Luit Staghouver pro lia rezultoj je kvizo.
- ☆ La somera Esperanto-kunveno de la 12-a de junio.
- ☆ La prelego de Ed Borsboom en Alkmaar. Pro tio Koos iris tien, sed la Alkmaar-a retpaĝo bedaŭrinde fuŝis pri la dato. Koos do maltrafis la prelegon pri Andreo Cseh. Aŭdinte, ke ĝi estis interesa, li certe ne maltrafos la sekvan eblecon, kiu okazos la **23-an de septembro 2004**. Tiam Ed Borsboom venos al Groningen.

La programo de la pasinta fojo ne vere okazis. Ni komencis paroli pri Hector Hodler. Wil van Ganswijk voĉlegis informojn, kiujn ŝi trovis je Interreto. Kelkajn frazojn ŝi ŝanĝis en demandojn. Luit Staghouver sciis ĉiujn respondojn, havante la saman tekston. Ankaŭ Henny van Hogen sciis ĉiujn respondojn, sed simple ĉar ŝi sciis.

La vera programo temis pri *Andreo Cseh*. Koos kunportis libron de Ed Borsboom kaj voĉlegis parton. Mi memoras kolumnon de Andreo Cseh, en kiu li parolis pri iu germana kursano de li, kiu skribis: „*Mi ne venas al supjuĝo, mi legas en lito*“. Nur post traduko en la germanan *Unterricht* (laŭvorta traduko de *subjuĝo*) Andreo Cseh komprenis la fra-

zon. Pro tio, ke la germano estis malsana, la vorto *legas* devis signifi *kuŝas*. Tiel Andreo Cseh eksplikis, ke lerni fremdan lingvon estas ne nur malfacile, sed ankaŭ amuze.

La 15-an de aprilo

Surtable estis fotoj, kiuj montras esperantistojn el la jaro 1961/1962. Malnovaj gekonatoj! Malnovaj historioj! Ni maljuniĝas!

Jen la nuntempo. Wil, kiu preparis agrablan programon, rakontis pri la renkontiĝo okazinta la 12-an de junio.

Certe estas, ke venos grupo da germanaj geamikoj!

Koos menciis, ke la Groningen-a klubo (aŭ ĉu estas *groninga*? Sed tiu diskuto okazis dum alia kunveno) aperis en Interreto kaj li ankaŭ preparis provmodelon de bulteno *La Verda Stelo*. Ĉu li estos la venonta redaktoro?

Wiebren demandis pri traduko de *openbaar onderwijs*. Ni ne trovis bonan tradukon. Ĉu vi?

Bets montris foton de la klubo el Murmansk. Kaj fine restis ankoraŭ iom da tempo por ludi. Ineke kunportis malnovan kartludon, kiun ŝi heredis de s-ino Meijwes.

La 29-an de aprilo.

Komence, ni demandis nin, ĉu la vorto *ŝalmo*, kiu signifas *limonaderietje*, taŭgus ankaŭ por *kafo*. Estis Wil, kiu bezonis tiun ilon pro ĵus travivita dentista turmentado.

La klubo bonvenigas kiel novan membrinon s-ino Nassenstein-vd Leest, kiu estas interretkursanino de Wil. Ŝi estas nederlandanino, kiu loĝas en sudorienta parto de Francio en la urbo Lamastre. Ŝi sendis por prezenti sin al Wil leteron, en kiu troviĝis kelkaj be-

legaj ekzempleroj de bondezirkartoj kaj aliaj paperkreaĵoj, kiujn ŝi faris.



Koncerne la interreta kurso montriĝas, ke foje pro tiom da entuziasmo oni sendas multajn taskojn, kaj samtempe kaj en ĉiam malpli da tempo. Unuflanke tio estas aplaŭdinda, sed aliflanke la plibonigoj ne plu estas aplikeblaj en sekvaj lecionoj, ĉar ankaŭ tiuj jam estas ensenditaj.

Ineke kompilis novan *Nuntempe*, en kiu estas troveblaj informoj pri i.a. venonta kongreso en Pekino, kaj de Marc van Oostendorp nova libro, kies temo estas *la historio de Esperanto*.

Koos transprenos la taskon de Henk kaj Petra van Kappen: kompilado kaj aperigado de nia informilo *La Verda Stelo*. Li montris ekzemplon, kiun aprobis la ĉeestantoj.

La temo estas *gramatiko*. Unu el la anoj de listo *Esperanto-cursisten* de Yahoo publikigis memfaritan *Ŝtelrigardilon* (Spiekbrief), kiu estas kolekto de diversaj gramatikaĵoj. Ni priparolis la participojn, kiuj finiĝas per *-unt* kaj *-ut*, sed kiuj ankoraŭ ne estas oficialaj. Oni uzadas ilin por esprimi nerealecon.

Ni kune trafosis la plej novan eldonon de *La Verda Stelo*. Malsamas opinioj pri vortoj kiel *groninga* kaj *Groningen-a*, kaj pri la ortografio de *transsiberia* kaj *transiberia*.

La 13-an de majo

La 5-an de majo oni festis *Liberiĝtagon*, la datreveno de liberiĝo de la Dua Mondmilito, ankaŭ en la Groningen-a urboparko. Tie estis Esperanto-stando, pri kiu Wil montris al ni fotojn.

Koos listigis de nia biblioteko ĉiujn librojn, kiuj troviĝas en skatoloj. Antaŭ ol fordoni la librojn, li petos konsilon kion fari pri ili de s-ro Sikosek, la oficisto de Biblioteko Hektor Hodler en Roterdamo, ĉar eble kelkaj libroj indas tie konservi.

Hans Erasmus, estrarano de Fondaĵo *Esperanto bij het Onderwijs*, sendis mesaĝon al Wil koncerne la eksterordinaran katedron ĉe la UvA, *Lingvistiko kaj Esperanto*, kies docentecon okupas Wim Jansen. Ĉar li tre kontentigas, la universitato proponis plivastigon de tiu katedro, kondiĉe, ke la asocio Esperanto Nederland pretos pagi 3026 eŭrojn por jaro. Tio kreos novajn ŝancojn por la Esperanto-movado, ĉar studentoj povos ekzameniĝi pri la lingvo Esperanto, kio kontribuos al punktoj akirendaj por la licencia ekzameno. Dum la jarkunveno de Esperanto Nederland, oni bedaŭrinde ankoraŭ ne decidis pri tiu subvencio, ĉar la fondaĵo tute asimiliĝas al Internacia Esperanto Instituto en Hago. Wil legis en gazeto *Horizontaal* artikolon pri *Charles Bliss* (1897-1985), kiu kreis artefartan lingvon, kiu baziĝas sur 100 pikto-gramoj. Tiuj estas simplaj, grafikaj elementoj, kiuj povas kombiniĝi en novajn simbolojn.

Www.lernu.net estas interesa retejo por lerni Esperanton.

El revuetoj nomataj *Enigmoj* Luit donis al ni puzlojn. Priskriboj kaŝis bestnomojn, kiujn ni serĉu en literpuzlo. Poste ni solvis diversajn strangajn enigmojn, ofte kune kun la helpo de Luit. Ni tre amuziĝis. La 27-an de majo ni kune manĝos en picejo *Il Lago* ĉe Hoornse Meer, kio estos la lasta antaŭsomera klubkunveno.

Esperanto-tago granda sukceso. Raportas Johan Swenker

La 12-an de junio tridek du personoj kunvenis en Groningen por kune paroli Esperanton. Ni havis multajn gastojn el Germanio. Venis ne nur anoj de la bremena klubo, sed ankaŭ de ĝia apuda Esperanto-grupo Subvisurgo. *Subvisurgo* estas la latina, do ankaŭ la Esperanta nomo de la regiono nordoriente de Bremeno, kie la rivero Vezero (Weser) enfluas la Nordan Maron. Ni ŝipveturis tra la Groningen-aj kanaloj. Ni intencis regali la gastojn en la boato per kafejo, sed en la boato oni ne pretigas ĝin. Feliĉe ni sciis tion antaŭe. Tial ni komencis en la stacidoma restoracio, kie Wil eksplikis la programon kaj la busvojaĝojn inter la urbocentro kaj la lunĉejo, kaj inverse. Rondveturinte, ni iris aŭtobuse al Immanuel-preĝejo por kune manĝi. Je la haltejo *Overwinningsplein* mi laŭte diris, ke ĉiuj devas eliri. Ĉar mi uzis Esperanton, reagis nur la esperantistoj. Surtablo en la salono estis tasoj, lunĉpakedoj kaj ankaŭ nomkartoj, do bone miksiĝis la nederlandanoj kun la germanoj, la konatoj kun la



Wil eksplikas...

ankoraŭ-ne-konatoj.

Post la manĝo Johan bonvenigis ĉiujn kaj Wil rakontis pri la Navigadmuzeo laŭ notoj, kiujn ŝi faris dum la prelego de d-ro Kerkmeijer, konservisto de la muzeo. Ree en la urbocentro proksimume dek personoj decidis viziti la

urbon. Ja estis bona vetero kaj iri al Groningen oni ne faras tion ofte.

En la muzeo estas tro multe da legendaj aferoj. Ĉar mi ankaŭ volis paroli kun Koos, mi ne legis multe. Mi rigardis multajn aferojn, sed verŝajne mi ne vere multe vidis. En la tabaka parto de la muzeo ni parolis kompreneble pri fumado.

Interalie pri ilo, kiun lia patrino iam uzis por mem fari cigaredojn. Kaj vere, tiun ilon ni



krespo-ŝipo

trovis en iu ekspozicia ŝranko.

Je la 17-a horo ni ariĝis sur la krespoŝipo por komuna manĝo. Mi agrable parolis kun Arjen-Sjoerd, kiu sidis apud mi. Mi laste renkontis lin antaŭ versajne 10 jaroj. Li estas konata pro sia studlibro de Esperanto. Kiam al alia tablo alvenis grupo por fraŭla festo, li tuj uzis la Esperanto-vorton *edziĝonto*. Mi kaj verŝajne ankaŭ vi komprenas la vorton, sed nur kelkaj esperantistoj simple uzas ĝin.

Post pago por la manĝo mi promenis al la stacidomo por preni mian biciklon. Biciklante hejmen, ankoraŭ resonis la laŭdoj de la homoj pri la bonega Esperanto-tago, kiun Wil organizis. Ĉu denove post du jaroj?

Red: La germanoj intencas sekvan jaron inviti nin i.a. por admiri ĉe ili la florantajn rododendro-arbustojn.

Neniam al hundo manĝigu fungojn. Verkis J.S. Veen

La granda regiona hospitalo ĉe la rando de la urbeto d' Obrevid baniĝis en aŭtuna sunbrilo. Ĉirkaŭ la ĉefkonstruaĵo kaj inter la pavilonoj sterniĝis mola herbotapiŝo. Ĝia verda koloro ĝuste tiam, meze de oktobro, ekhavis tiun obtuzan nuancon, kiu tiel agrable kontrastis kun la rozofruktoj. Pli multnombraj ol la rozoj tamen estis la begonioj. Ili montris siajn lastajn florojn, helkolorajn de pura blanko ĝis flama ruĝo. Sur la padoj promenis pluraj homoj vestitaj per negliĝoj. Evidente ili estis pacientoj resaniĝintaj post operacio. Ĉe la pordo de la poliklinika atendejo sidis homoj, kiuj bezonis konsulti specialiston. Ili kalkulis je longa vicatendo kaj preferis sidi sub la blua ĉielo anstataŭ en la atendejo kun ĝia iom prema malsanuleja atmosfero. Iuj virinoj forpelis la enuon per trikado. Aliaj atendantoj legis libron aŭ revuon, kelkaj interparolis, sed multaj nur sidis kaj silentis. Knabineto klopodis legi la ŝildojn fiksitajn flanke de la enirejo. La knabineto, en la aĝo de konatiĝo kun la alfabeto, streĉatente rigardis ŝildon dum ŝi mallaŭte murmuris. Kvazaŭ ŝi per la lipoj palpe serĉis

la sonojn de la literoj. Subite ŝi montris al la ŝildo kaj fierete krietis:

„Panjo, Vitkor Ingvant.”

„Preskaŭ korekte,” diris la patrino, „Ne estas Vitkor, sed Viktor. Bone rigardu.” Tuj la knabineto rimarkis sian eraron. Tute ne konfuzita ŝi brave atakis la literojn de alia ŝildo: „Petro Dor..ja.n, oto..rin, otor..in..ol ari..., Panjo, tion mi ne povas legi. Kio staras tie?”

La patrino rigardis la ŝildon kaj post du vanaj klopodoj ŝi iom pene legis: „Otori-



nolaringologo.”

„Kio estas tio?” time demandis la infano. En ŝia spirito la vorto asociiĝis al ĉefrolulo en desegnita filmo, kiun ŝi spektis antaŭ kelkaj tagoj. Hu, granda staturo, nigra felo, verde lumantaj okuloj, longaj brakoj kun vilaj manoj karakterizis la monstron, en kies faŭkon je unu gluto povas malaperi infaneto. La patrino rimarkis la ek-timiĝon de sia filineto kaj diris al ŝi:

„Ne timu. Ĉi tiu malfacila vorto estas nur scienca vorto. En ordinara lingvo tio signifas kuraciston por orelo, nazo kaj gorgo.

Ĉi tiu doktoro Dorjan ĝuste estas la afabla sinjoro, kiun ni hodiaŭ vizitos. Li forigos la doloron el via orelo.”

„Sed mia orelo ne plu doloras, panjo. Ni iru hejmen,” diris la knabino, ankoraŭ ne tute trankviligita.

„La doloro sendube revenos,” avertis la patrino, „Kaj se via orelo pli kaj pli malboniĝus, vi devus plurfoje reveni ĉi tien aŭ eble eĉ restadi ĉi tie kelkajn tagojn. Pli bone do, ke la kuracisto nun helpu vin. Nu, eksidu ĉe mi. Ĉu vi vidas tie la ruĝan tabulon? Ĉu vi povas legi kion sur ĝi staras?”

La infano momenton fikse rigardis la tabulon kaj tiam laŭtlegis:

„Sukurejo.”

Ĉi tiun vorton ŝi legis gajmiene kaj ŝi demandis: „Ĉu sukurejo estas dometo simila al la kuka domo en mia fabelolibro?”

„Ne,” respondis la patrino, „Ne temas pri sukerujo, sed pri sukurejo. Tio estas io tute alia. Tio estas loko, kie homoj vunditaj pro akcidento ricevas la unuan helpon. Vi scias, ke antaŭ nelonge mi falis kun la biciklo kaj de tio mia piedo kontuziĝis. Nu, tiam oni alportis min ĉi tien al la sukurejo. Kompleza flegistino purigis la vundon kaj bandaĝis mian piedon.”

Se la patrino povus rigardi tra la muron, post kiu la sukurejo troviĝis, ŝi vidus la kompletan flegistinon, kiu helpis ŝin antaŭ nelonge. Jam kvar jarojn flegistino Genjo tie laboris. Kun sia svelta figuro, iom severa vizaĝo, tamen kun brileto de rido en la okuloj, ŝi estis flegistino tre taŭga por akcepti la ofte ekscititajn viktimojn de akcidento. Hodiaŭ flegistino Genjo jam helpis dek-unu personojn. Ĉar la kontuzoj estis ne tre

gravaj, ŝi memstare povis helpi kaj neniu el la kontuzitoj bezonis restadi en la hospitalo. Genjo de la oka seninterrompe laboris. Ĵus pasis la dekunua horo kaj feliĉe ne plu alvenis novaj viktimoj. Genjo ĝojis, ke nun ŝi havas momenton por spiri. Servistino de la kuirejo alportis al ŝi tason da kafo kaj restis kelkminute babili. Post tio ŝi komencis ordigi kelkajn administraĵojn de la tago. Proksimume dek minutojn ŝi okupis sin pri la paperaĵoj, kiam subite enrapidis du junaj viroj. Iliaj vizaĝoj estis ruĝaj de ekscitiĝo kaj el iliaj buŝoj bruis konfuza torento de sonoj. Genjo nur distingis la ofte ripetatajn vortojn: arbaro...hundo...veneno.

„Trankvile, trankvile, sinjoroj, mi petas,” admonis Genjo, „Unu el vi bonvolu trankvile diri pro kio vi venas ĉi tien.”

Ŝi turnis sin al la viro, kiu ŝajne estis la malpli ekscitita kaj demandis: „Kiu vi estas kaj kio okazis?”

La viro respondis: „Mi estas Vilmo Spacler. Mi kun mia amiko Enriko Koldro vagis hodiaŭmatene en la arbaro kaj serĉe kolektis fungojn manĝeblajn...” „Ho, mia ventro, kiom ĝi doloras,” ĝemkrie interrompis Enriko, „Kiom ĝi ŝveliĝas!” Kun tordita vizaĝo li faligis sin en agonia pozicio sur benkon ĉe la muro. Vilmo plu rakontis al Genjo tion, kio okazis al ili en la arbaro, sed daŭre li estis interrompata de vekriado kaj plorĝemoj de sia amiko. Genjo atente aŭskultis ĝisfine. Ŝi avertis kaj informis kuraciston per la interna telefono. Momenton poste d-ro Ingvant eniris la sukurejon. Li formis akran kontraston kun la gracitalia flegistino. Ŝi havis malpezan figuron, delikatan vizaĝon kaj klaran melodian voĉon. Ŝia aspekto pensigis pri ĉarma birdeto rapidmova.

D-ro Ingvant male estis krudstatura, havis fortikan kapon kaj voĉon basan. En sia blan-

ka medicinista mantelo li vekis pensojn pri miksaĵo de leono kaj polusa urso.

„Kion mi aŭdis, friponoj?” li tondris al la du viroj, „Kion vi permesas al vi: Vi serĉis en la arbaro fungojn. Vi trovis specon al vi nekonatan kaj dubis pri la manĝeblo. Sekve vi provis, ĉu tiaj fungoj estas venenaj; vi manĝigis ilin al hundo, kiun vi



hazarde trovis tie vaganta.

Vi plue kolektis dum preskaŭ unu horo kaj tiam, vidante la hundon ankoraŭ bonfartanta, vi

decidis konsumi ankaŭ de la samaj fungoj. Riski la vivon de hundo pro porcio da fungoj. Kiel diabla penso! Duonan horon post via konsumado tamen la hundo komencis vebleki kaj konvulsie rampi ventron sur la tero. Evidente ĝi estis venenita! Vi ektimis, ke baldaŭ vi same suferos pro via fungofrandado. Nu, ĉu vi havas ankoraŭ kelkajn el la fungoj?”

„Jes, estimata sinjoro profesoro,” diris tremvoĉe Vilmo; lia amiko de timo mutiĝis. El sia korbo Vilmo transdonis unu el la koncernaj fungoj al d-ro Ingvant, kiu per atentaj okuloj ekzamenis ĝin kaj poste ĝin flaris. Gravmiene li diris: „Malbona afero. Lasu al mi palpi vian pulson.”

La kuracisto palpis la pulson kaj krome observis la langon ĉe ambaŭ malbonŝanculoj. „Tuja danĝero de morto ne minacas vin. Mi nun estas scivola kiel fartas la tria paciento, fakte la unua, nome la hundo. Ĝi atendas ekstere, mi supozas.”

Denove tremvoĉe Vilmo respondis: „Estimata sinjoro profesoro, ni lasis la beston en la arbaro. Vi komprenas,...ni estis tre ekscititaj...kaj...”

„Mi komprenas nenion,” furioze ekmuĝis d-ro Ingvant, „Mi nur komencas kompreni, ke

vi senskrupule lasis en la arbaro kompatindan beston, kvankam vi vidis ĝin veni en tre mizeran staton. Stato –notu bone!– intence kaŭzita de vi, sinjoroj. Misuzi vivantan estaĵon kvazaŭ ĝi estus senvalora ludilo forĵetinda! Kaj nun la sinjoroj panike venis ĉi tien plendantaj, plorantaj kaj ludantaj agoniajn scenojn. Flegistino,” turnis sin la kuracisto al Genjo, „Bonvolu zorgi, ke la pacientoj glutu antidoton. Kvindek gramojn de amara placebo je 60 procentoj. Poste ili trinku po kvaronan litron da lakto. Tiam ili povas reiri al la arbaro kaj tie serĉi la hundon. Vi, sinjoroj venigu la beston ĉi tien, ĉu viva aŭ morta. Nepre revenu, ĉar vi bezonos mian traktadon ankoraŭ.”

Vilmo kaj Enriko iom post la tagmeza horo promenis flankon ĉe flanko en la arbaro kaj tenis korbon inter si. La korbo estis proprajĵo de la hospitalo kaj la du amikoj prunte ricevis ĝin, por ke ili povu porti la hundon. Genjo metis botelon da lakto en la korbon. Por la hundo ŝi aldonis laŭ ordono de d-ro Ingvant boteleton, en kiu estis miksaĵo de lakto kaj antidoto. Genjo emfazis, ke estas grave por la hundo tute engluti la plenan enhavon de la boteleto. Ili mem devis trinki la lakton el la granda botelo kaj laŭplaĉe ili manĝu de la buterpanoj, kunportintaj matene el la hejmo.

La amikoj atingis la lokon, kie ili laŭ sia konjekto matene postlasis la hundon en tiel mizera stato. Kiel ĝi vekblekis kaj spasme rampis zigzage sur la herbo. La amikoj tamen komencis dubi, ĉu ili troviĝas vere sur la loko de sia matena senpripenseco. La hundon ili nenie vidis. Iom konfuzita la duopo staris sur la interarba herbokampo kun ĝiaj disaj grupoj de arbedoj. Verŝajne ili ankoraŭ devis serĉi plurajn horojn. Tio ne estis alloga perspektivo. Des pli, ĉar ili jam

estis lacaj kaj ŝvitantaj. La suno en ĉi tiu oktobra tago brilis forte kaj kaŭzis temperaturon, kiu ne instigis al korpa laboro nekutima. Krome la korbo ŝajne fariĝis daŭre pli peza.

„Kial ni ne eksidu sur la herbo?” diris Enriko, „Mi estas laca kaj ankaŭ vi, ĉu?”

„Jes,” konsentis Vilmo, „Ni sidiĝu sur la herbo. En tre malagrablan situacion ni enŝovis nin. Ion tamen mi de tio lernis: Neniam al hundo manĝigu fungojn. Hodiaŭmatene mi kompreneble pensis ne pri morto, sed plej ekstreme pri iometo vomado de la hundo.”

„Ankaŭ mi tute ne pensis pri morto,” parolis Enriko, „Ni agis senpripense. La kuracisto tre krude riproĉis nin, sed li pravis.

Stultaĵon ni faris. La glutado de la kontraŭveneno cetere ne estis plezuro. Kiel amara aĉa gusto! Eble ni bezonos plurajn tagojn gluti la abomenan fluidaĵon. Tamen al mi ĝi jam efikis sanige. Mi eĉ nun sentas apetiton. Sed tio signifas nenion, ĉar ankorau semajnojn post veneniĝi eble sekvos gravaj suferoj, kiel difektiĝo de reno, stomako, hepato aŭ koro. Ankaŭ blindeco kelkfoje estas sekvo...”

Vilmo interrompis la malgajajn konsiderojn de sia amiko, proponante: „Ni manĝu iom da pano. Ankaŭ mia stomako ekmurmuras.”

La amikoj manĝis kun bona apetito la buterpanojn, tiurilate ili jam ne estis suferantaj. Enriko tamen montriĝis ankoraŭ konfuzita, kiam li diris: „Mi ne kuraĝas reiri sen hundo al la malsanulejo. Kion fari kiam ni ne trovos ĝin? Ĉu eble estus solvo, se ni aĉetus ian hundon? Aŭ...eble pli oportune..., mi havas konaton, kiu posedas hundon. Ni povus pruntepreni ĝin...”

Vilmo ironie rimarkigis: „Kaj ni manĝigu ankaŭ al tiu hundo fungojn por fari la teatraĵon kompleta. Ni ne faru tion. Ni serĉu. Certe

estas malfacile trovi mortintan hundon. Besto, kiu sentas proksima la morton, inklinas kaŝi sin. Ni do devas atente rigardi inter la arbedoj. Mi tuj komencas. Vi ripozu ankorau.”

Vilmo ekstaris kaj prenis branĉon kuŝantan sur la tero. Li suriris vojeton kaj post mallonga distanco ĉiam denove iris flanken inter la arbedojn.

La branĉon li uzis kiel bastonon. Per ĝi li flanken fleksis la branĉetojn, kiuj malhelpis fundan observadon.

Enriko sidis ĉe la korbo. Li metis la restaĵon de la pano kaj la lakto en la korbon. Kiam li faris tion, lia rigardo trafis la boteleton de antidoto por la hundo. Li denove sentis akran bedaŭron kaj malgaje pensis, ke la kuracisto estis tro optimista rilate al la stato de la hundo. Sed la kuracisto ne vidis, kiel la besto matene estis proksima al la morto. Subite krio vekis Enrikon el lia ĉagrena cerbumado. Je distanco de pli ol cent metroj staris Vilmo, kiu per brakmovo gestis al li, ke li venu. Enriko forgesis fermi la korbon kaj rapide ekkuris. Fine de la kurado timo pro la kadavro kaptis lin. Hezite li faris la lastajn paŝojn al Vilmo. Ĉi tiu kaŭre sidis inter la arbedoj. Jen vere tie kuŝas la hundo. Vivanto! Vilmo karesis la beston. Sendube ĝi rememoris de la mateno la viron doninta manĝaĵon, ĉar ĝi lekis la manojn de sia „bonfaranto”. (Kio estas hunda saĝo?) Ne sole Vilmo estis lekata. Pli malavaran lekadon ricevis la ĵus naskitaj tri hundidoj, kiuj interpuŝiĝis ĉe la patrina korpo.


sendis A. Oosterwijk-Dominicus

☆☆☆

Contributie afdeling Groningen-Drente

Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO)	€ 11,34
Gezinslid	€ 5,67
Donateur (minimaal)	€ 5,67
Abonnement LA VERDA STELO	€ 5,67

Over te maken op Postbanknr. **3822472**
ten name van afd. Groningen-Esperanto Nederland te Bedum



Leden van afd. Groningen-Drente worden geacht lid te zijn van
ESPERANTO NEDERLAND.

Vandaar dat wij ook hier het gironummer ervan vermelden:
Postbanknr. **375522** ten name van ESPERANTO NEDERLAND
te Heerhugowaard

Lidmaatschap ESPERANTO NEDERLAND

Lid (incl. abonnement Fen-X)	€ 25,00
Gezinslid	€ 7,50

Esperanto-klubo GRONINGEN-DRENTE

T.W.S. Mansholtstraat 25

9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO – *taal zonder grenzen*